## La lingvo volofa « Wolof »

La « volofa » estas ĉefe parolata en Gambio kaj en Senegalio, kie ĝi estas unu el la ses naciaj lingvoj. La « volofa » estas nacia lingvo ankaŭ en Maŭritanio. Uzita kiel vehikla lingvo i.a. de la komercistoj, ĝi estas iom la angla de Okcidenta Afriko. Se 40% de la Senegalianoj apartenas al la « volofa »-etno, inverse 80% da ili estas « volofa »parolantoj. Tiu lingvo pliriĉiĝis per depruntaĵoj de aliaj nacilingvoj de Senegalio, de la araba kaj de la franca.

Kiel la manĝaka, la serera kaj la fula, la volofa apartenas al la lingva familio "okcident-atlantika" de la grupo Nigerio-Kongo. Unue parola lingvo ĝi estis unuatempe skribita per arabaj karaktroj ; ekde 1971 la volofa estas oficiale skribita per latinaj literoj. Esploristoj de la Aplik-lingvistika Centro de Dakar (CLAD : Centre de Linguistique Appliquée de Dakar), starigis regulojn pri ortografio, konjugacio kaj gramatiko.

**Fonetiko (supraĵa vido)**

c : prononciĝas kiel "ti" en "timi".
j : prononciĝas kiel "di" en "dio".
ñ: prononciĝas kiel "nj" en "panjo" .
x : prononciĝas kiel "k" en « kilo » aŭ en la antaŭnomo "Cheikh"
q : prononciĝas kiel « ĥ » en „ĥimero” ; estas la "k" guturala de la araba
w : prononciĝas kiel "ŭ" de „ŭato” aŭ de "oui (jes)" en la franca.
e : prononciĝas kiel "e" aŭ « é » en la franca.
ë : prononciĝas kiel "eu" en la franca « Europe ».
u : prononciĝas "u" kiel en « turo »

**Eta leksikono**

*Salamalekum*
*Malekum salam*
Kiel vi fartas? : *Nanga def?*
Mi fartas bone : *Mangi fi rekk* (laŭvorte .mi ĵus estas tie)
Kiel fartas viaj familianoj? : *Ana waa kër gi?*
Ili bone fartas : *Ñunga fa rekk.*
Kiel fartas la aferoj ? : *Naka afeeri?*
Ĉio glatas : *Mingi dox.*
Kiel ci nomiĝas ? : *Noo tudd?*
Mi nomiĝas... : *Mangi tudd...*
Kie ci loĝas? : *Foo dëkk?*
Mi loĝas en …: *Mangi dëkk ….*
Donu al mi akvon por trinki : *May ma ndox ma naan.*
Donu al mi cigaredon : *May ma benn sigaret.*
Kiom tio kostas?: *Ñata lay jar?*
Multekostas! : *Bare na!*
Dankon : *Jërëjëf (dieureudieuf)*
Oni trinkas senegalan teon?: *ñu naan ataya ?*
Matenmanĝo : *ndekki*
Tagmanĝo : *añ*
Vespermanĝo : *réer*
Estas bongusta : *neexna torob.*

Mi lernas la « djembean » (djemba : lingvo) : *damay jang tëgg jembé*
Mi sabaras (sabaro : musikinstrumento) : *damay tëgg sabar*
Mi tuj banos min en la maro : *mangi dem sangu ji géej*
Venu! : *Kaay!*
Mi foriras, ĝis revido: *Mangi dem.*
Ĝis baldaŭ : *Ba bennen.*

## La vokaloj

En la **volofa**, estas kontraŭstaro inter mallonga vokalo kaj longa vokalo, same estas konstraŭstaro inter simpla konsonanto kaj forta konsonanto, ĝenerale nomita « ĝemela ».
Tiu diferenco de longeco inter la vokaloj, kaj de akcento inter les konsonantoj konstituas elementon de diferencigo inter la signifoj de vortoj.
Mallonga vokalo estas skribita per unu litero (ekz. a, e, i, o, u) kaj per du literoj kiam temas pri longa vokalo (ekz. aa, ee, ii, oo, uu).
Same por la konsonantoj : simpla konsonanto estas skibita per unu litero kaj forta konsonanto per duobla litero :

## Simplaj vokaloj :

| | | |
|---|---|---|
| a : | Meza vokalo : | |
| | *At* : jaro. | *aat* : neinicito (cirkumcidado). |
| e : | Antaŭvokalo, mezmalfermita : | |
| | *set* : esti propra. | *seet* : rigardi, serĉi. |
| i : | Antaŭvokalo fermita : | |
| | *nit* : persono. | *niit* : lumigi. |
| o : | Malantaŭvokalo, mezmalfermita : | |
| | *or, wor* : perfidi. | *oor, woor* : fasti. |
| u : | Malantaŭvokalo, fermita (prononciĝas kiel « u » en esperanto : | |
| | *tur* : antaŭnomo. | *tuur* : elverŝi. |

## Derivitaj vokaloj

| | |
|---|---|
| à | Mezvokalo, nomita ankaŭ maksimuma vokalo, prononciĝas « a » malfermita, kun inklino al plilongigo. Ĉiam sekvas ĝin forta konsonanto (ĝemela) aŭ antaŭnazala. La diferenco inter « a » kaj « à » : « à » estas tre malfermita, « a » estas prefere fermita. |

| | | |
|---|---|---|
| | *lakk* : bruligi, rosti.<br>*làkk* : paroli fremdlingvon. | *lamb* : esti nevendita.<br>làmb : palpi. |
| é : | Antaŭvokalo duonfermita. Ĝia longa formo estas « ée », kun supersigno nur sur la unua litero, pro ortografia ekonomio.<br><br>*sét* : nepo, nepino. | *séet* : novedzino. |
| ë : | Mezvokalo duonfermita. Ĝia longa formo estas « ëe ». En la volofa ĝi ekzistas nur kiel mallonga formo. Longa formo ekzistas nur en vortoj pruntitaj de la franca aŭ de aliaj lingvoj.<br><br>*bër* : ferii. | *bëer* : butero. |
| ó : | Malantaŭvokalo duonfermita, ĝia longa formo estas « óo ».<br><br>*dóom* : cindro. | |

## Konsonantoj

| | |
|---|---|
| b : | Ploziva, labiala, voĉa konsonanto. Je la finalo de vorto, ĝi prononciĝas kvazaŭ kiel « p ».<br><br>*bés*: tago |
| c : | Ploziva, palatala, senvoĉa konsonanto. Prononciĝas iom kiel « ĉ », aŭ kiel la sono ch en la de hispana vorto "chico", aŭ en la angla "church".<br><br>*ceeb* : rizo. |
| d : | Ploziva, dentala, voĉa konsonanto.<br><br>*dem* : foriri. |
| f : | Frikativa, labiala, senvoĉa konsonanto.<br><br>*fas* : ĉevalo. |
| g : | Ploziva, velara, voĉa konsonanto. Prononciĝas kvazaŭ « k » je la fino de vorto.<br><br>*golo* : simio. |
| h : | Laringala senvoĉa konsonanto. Ĝi havas la saman valoron ke la angla « h » en la vorto "how". Renkontiĝas nur en la volofa de la regiono de Saloum, kaj en maloftaj vortoj aŭ esprimoj.<br><br>*ahakay !* : se ! |

| | |
|---|---|
| j : | Ploziva palatala voĉa konsonanto. Prononciĝas pli malpli kiel « ĝ » Je la fino de vorto, ĝi prononciĝas kvazaŭ kiel volofa « c ».<br><br>*jaay* : vendi. |
| k : | Ploziva velara senvoĉa konsonanto.<br><br>*kaay !* : venu ! |
| l : | Dentala voĉa flanka konsonanto.<br><br>*lem* : mielo. |
| M : | Nazala labiala konsonanto.<br><br>*Mer* : koleri. |
| n : | Nazala alveola (dentala ?) konsonanto.<br><br>*nelaw* : dormi. |
| ń : | Nazala palatala konsonanto. Prononciĝas kiel « nj » en « panjo ».<br><br>*ńam* : gustumi. |
| N : | Nazala velara konsonanto. Prononciĝas kiel la angla "ng" en "sing"<br><br>*Nas* : morbilo. |
| p : | Ploziva labiala senvoĉa konsonanto.<br><br>*put* : gorĝo. |
| q : | Ploziva velara senvoĉa konsonanto. Nur la araba havas tian sonon. Eblus konsideri ĝin kiel la senvoĉa "ch" en la germana "Bach".<br><br>*làq* : maski, kaŝi. |
| r : | Dentala « ruligita » konsonanto, iom kiel la itala « r ».<br><br>dara : io. |
| s : | Frikativa dentala senvoĉa konsonanto.<br><br>*solo* : graveco. |
| t : | Ploziva alveola senvoĉa konsonanto.<br><br>*tey* : hodiaŭ. |
| W : | Labiala aŭ velara duonvokalo. Sama valoro kiel la angla "w" en "will".<br><br>*watu* : razi sin. |

| | |
|---|---|
| x : | Frikativa velara voĉa konsonanto. Sama sono kiel en la germana "ch" en "Bach".<br>*xale* : infano. |
| y : | Palatala duonvokalo .Sama-valoro kiel la angla "y" en "yes", aŭ « j » en esperanto.<br>*yaay* : panjo. |

## Konsonantoj

Ili havas la samajn artikulaci-punktojn kiel siaj samvaloraj. Oni ne trovas ilin kiel vortkomencajn literojn.

| | | | |
|---|---|---|---|
| bb : | *ràbb* : teksisto<br>*ubbi* : malfermi | cc : | *rëcc* : forfuĝi, eskapi<br>*gàcce* : honto |
| dd : | *guddi* : nokto<br>*gudd* : longa | gg : | *eggali* : finfari<br>*dugg* : eniri |
| jj : | *mujj* : lasti<br>*gajj* : fuŝtranĉi | kk : | *dàkk* : celi<br>*jukki* : ĉerpi |
| ll : | *wulli* : tani<br>*àll* : veprejo | mm : | *gëmm* : fermi la okulojn<br>*gémmiń* : buŝo |
| Nn : | *sàNni* : ĵeti<br>*feNn* : nenie | NN : | *woNNeentu* : baŭmi<br>*doNN* : sola |
| pp : | *soppi* : ŝanĝi<br>*sopp* : tenere ami | tt : | *gàtt* : etulo<br>*butti* : entranĉi, senintestigi |
| ww : | *yewwi* : liberigi<br>*faww* : senbremsa | yy : | *noyyi* : spiri<br>*bàyyi* : lasi |

Rim. : krom kaze de emfazo, la aliaj konsonantoj ne estas « ĝemelaj ».

## Konsonantoj

| | |
|---|---|
| mb : | Prononciĝas kiel en la sudfranca "tu m'embętes", en un sola sono.<br>*mburu* : pano. *gumbo* : blinda. |
| nd : | Prononciĝas kiel en la franca "andouille", kun nazala sono.<br>*màndi* : ebrii. *bind* : skribi. |
| Nj : | Kunmeto de "ń" (« nj ») kaj "j" (« ĵ »), kiel en la vorto *Ndiaye*. |

| | | |
|---|---|---|
| | *njél* : ektagiĝo. | Xànjar : kupro. |
| Ng : | Nazala segmento "ng" kiel en la vorto « anglais ». | |
| | *jàNg* : lerni, ekscii. | *Ngoon* : posttagmezo. |

Ĉiuj antaŭnasaloj prononciĝas laŭ unu sono. Temas pri fonetikaj unuoj propraj al tiu lingvo.

Male, ekzistas en tiu lingvo grupoj da konsonantoj, kiuj havas similan strukturon t.e. "nazala + ploziva", sed kiuj prononciĝas laŭ du sinsekvaj sonoj. Jen ili :

| | |
|---|---|
| mp : | Prononciĝas "m", kaj "p".<br>*samp* : planti. |
| Nt : | Prononciĝas "n", kaj "t".<br>*buNt* : pordo. |

En jenaj grupoj la nazala "n" estas influita per la dua konsonanto :
tiam "ń" prononciĝas kiel "ń" antaŭ"c".

| | |
|---|---|
| nc : /TD> | *denc* : gardi. |
| Nk : | "n" iĝas "N" antaŭ "k" :<br>*taNk* : piedo. |
| nq : | "n" proksimiĝas al "N" ankaŭ antaŭ "q"<br>*xonq* : ruĝa. |